Esperanto-kurso por komencantoj	Dato: 13.9.2023 Versio: 3	Xosé Conde Atribuite-Nekomerce-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda (CC BY-NC-SA 4.0)

1. Klasĉambra lingvaĵo

a. **Ĉu** vi komprenas?

b. Jes, mi komprenas

b. Ne, mi ne komprenas

a. **Kio** estas … en la kataluna?

b. … estas … en la kataluna

b. Mi ne scias

a. **Kiel** oni diras … en Esperanto?

b. ... en Esperanto oni diras ...

Bonvolu

- ripeti
- paroli en Esperanto
- paroli malpli rapide
- helpi min
- legi
- aŭskulti
- silenti
- ne krokodili
- fari tiun ekzercon
- eksidi
- ekstari

2. Salutoj

- Saluton!

- Bonan
  - matenon
  - tagon
  - vesperon
  - nokton

a. Kiel vi fartas?

b. Bone, dankon, kaj vi?

a. Ankaŭ bone, dankon.

b. Ĝis revido!

a. Ĝis!

3. Afablaj vortoj

a. Dankon!

b. Ne dankinde!

- Bonvolu
- Pardonu

4. Prezentoj

a. **Kiel** vi nomiĝas?

b. Mi nomiĝas Xosé

a. Ĉu vi povas ripeti?

b. Jes: Xosé

LIVEWORKSHEETS

Atribuite-Nekomerce-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda (CC BY-NC-SA 4.0)

Ekzercoj

1. Plenigu la truojn per unu el la vortoj listigitaj dekstre

1. Kiel vi .....?	a. kio
2. Mi ne	b. kiel
3. Bonvolu ..... en Esperanto	c. malpli
4. ..... estas … en la kataluna?	d. fartas
5. Ne, mi ..... komprenas	e. bonan
6. ..... oni diras … en Esperanto?	f. scias
7. ..... ne krokodili	g. paroli
8. ..... vesperon	h. ne
9. Bonvolu paroli ..... rapide	i. bonvolu

2. Kompletigu la dialogojn per vortoj el la fraz-modeloj

Dialogo 1:

a. Saluton, kiel vi .....?

b. ....., dankon, kaj vi?

a. Ankaŭ bone, ...

b. Ĝis .....!

a. .....!

Dialogo 2:

a. ..... nokton!

b. ...., ĝis revido!

a. Ĝis!

Dialogo 3:

a. Bonan .....

b. ....., kiel vi .....?

a. Bone, ...

b. Ĝis .....!

a. .....!

Dialogo 4:

a. Ĉu vi .....?

b. ....., mi ne ..... Ĉu vi ..... ripeti?

a. ....., mi .....

b. Dankon

3. Kompletigu la dialogojn per vortoj el la fraz-modeloj

Dialogo 1:

a. ..... vi fartas?

b. Bonvolu ripeti

a. Kiel vi .....?

b. ....., dankon. Kaj vi?

a. ..... ne fartas bone! Mi ne ..... Esperanton!

LIVEWORKSHEETS

Atribuite-Nekomerce-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda (CC BY-NC-SA 4.0)

Dialogo 2:

a. ..... labori duope

b. Pardonu, ... ripeti

a. Jes: bonvolu ..... duope

b. Mi ..... komprenas

a. Bonvolu labori en grupoj de du homoj

b. ..... komprenas, dankon

a. Ne .....

Dialogo 3:

a. ..... legi

b. Pardonu, mi ne komprenas. Bonvolu ripeti

a. Jes, mi ripetas: bonvolu .....

b. .... "legi" en la kataluna?

a. "legi" estas "llegir" en la kataluna. Ĉu vi .....?

b. Jes, ...!

a. Ne .....!

Dialogo 4:

a. Mi nomiĝas Ana, kaj vi?

b. Karlo

a. Ĉu vi povas .....?

b. Jes, kompreneble: Karlo

a. Mi ne ..... "kompreneble". ..... estas "kompreneble" en la kataluna?

b. "Kompreneble" estas "evidentment" en la kataluna

a. Dankon

b. ..... dankinde!

4. Asociu frazon de la unua kolono kun frazo de la dua kolono

1. Kiel oni diras “cadira” en Esperanto?
2. Bonvolu paroli malpli rapide
3. Kio estas “tabulo” en la kataluna?
4. Kiel vi fartas?
5.Bonan vesperon
6. Ĉu vi komprenas?
7. Dankon
8. Ĝis revido!

a. Bone, dankon, kaj vi?
b. Ne dankinde
c. Bonan vesperon. Kiel vi fartas?
ĉ. Jes, mi parolos malpli rapide
d. Ĝis!
e. “cadira” en Esperanto oni diras “seĝo”
f. “tabulo” en la kataluna estas “taula”
g. Jes, mi komprenas

LIVEWORKSHEETS